



www.lernu.net

La paĝaro por
Esperanto
INTERNACIA LINGVO

ridetu kaj lernu!
@ www.lernu.net

Kio estas Esperanto?

Ĝi estas lingvo.

Gravaj trajtoj de Esperanto:

Internacia

Esperanto ĉefe estas utila por komuni- kado inter homoj de diversaj nacioj kiam ili ne havas komunan gepatran lingvon.

Facila

Danke al la strukturo kaj la konstruado de la lingvo estas kutime multe pli facile ekregi Esperanton kompare kun iu frem- da nacia lingvo.

Vivanta

Esperanto evoluas kaj vivas same kiel aliaj lingvoj kaj per ĝi eblas esprimi ĉiujn aspe- ktojn de homa pensado kaj sentado.

Neŭtrala

Ĝi ne apartenas al iu speciala popolo aŭ lan- do kaj pro tio funkcias kiel neŭtrala lingvo.

Egaleca

Kiam oni uzas Esperanton oni sentas sin pli egala el lingva vidpunkto kompare kun uzi ekzemple la anglan parolante kun persono kiu havas la anglan kiel gepatran lingvon.

Por mi Esperanto estas bonaj amikoj el plej diversaj mondopartoj.
Oleg, 22, Rusio

Por ni estas ĝuo uzi Esperanton. Per ĝi ni ĉiutage interkomunikas kun amikoj de diversaj landoj kaj kontinentoj, plej ofte per Interreto. Ni spertas Esperanton kiel trafan ilon por amikeco kaj kunlaboro inter homoj de malsamaj gepatraj lingvoj.
La teamo de lernu!

La plej libera lingvo de la mondo!
Katja, 23, Svedio



Ĝi instigas min lerni pli, esplori pli kaj konatiĝi pli.
Jacob, 27, Usono

Esperanto estas granda parto de mia vivo.
Jevgenij, 25, Litovio

Esperanto permesis al mi malkovri alian mondon, senliman, buntan kaj amikecan...
Rafael, 27, San-Domingo

Plurlingva paĝaro por Esperanto



www.lernu.net

lernu! estas paĝaro, kiu enhavas informojn pri Esperanto kiel lingvo kaj fenomeno, plurajn kursojn kaj subtenilojn por lerni Esperanton. La ĉefa celo de la paĝaro estas helpi al retemuloj, kiuj volas facile kaj senpage informiĝi, kaj lerni la lingvon.

Ĉe la paĝaro troveblas diversnivelaj kursoj, vortaroj en multaj lingvoj, superrigardo de la gramatiko, aŭskulteblaj rakontoj kun bildoj, tuj-mesaĝilo por rekta interkomunikado ktp.

The screenshot shows the lernu.net website interface. At the top, there's a navigation bar with 'lernu!' and 'Kursoj'. Below that, a search bar and a list of languages including Esperanto (eo), Catalan (ca), Czech (cs), Danish (da), German (de), English (en), Spanish (es), French (fr), Italian (it), Japanese (ja), Korean (ko), Lithuanian (lt), Norwegian (no), Polish (pl), Portuguese (pt), Russian (ru), Slovak (sk), Swedish (sv), and Chinese (zh-tw). The main content area features several articles and sections: 'Bonvenon al lernu!' with a cat illustration, 'Pri Esperanto' with a green alien illustration, 'vortaro' (dictionary), and 'LA TUJMESAĜILO' (instant messenger). A sidebar on the right shows 'Ana Pana' and 'Parto 1 - Saluton! - Teksto'.

ridetu ridetu kaj lernu!

subtenantoj de lernu!

subtenantoj de lernu!

www.ikso.net

www.esperantic.org



lernu! estas realigata fare de la internacia laborgrupo Esperanto@Interreto (E@I). La tri ĉefaj agadkampoj de E@I estas krei ret-paĝarojn, aranĝi seminariojn kaj informi pri kiel Esperanto kaj Interreto kune uzeblas por tutmonde interkomuniki facile kaj rapide!

lernu! estas finance subtenata fare de la usona esplorfondaĵo Esperantic Studies Foundation (ESF). ESF fondiĝis en 1968 unuavice por subteni kaj stimuli la evoluon de la anglalingva faka literaturo pri Esperanto. Iom post iom la uzado de Esperanto en edukado fariĝis unu el la prioritataj zorgoj de ESF.

